3-a Jaro. N-o 109 APERAS  SEMAJNE 28. Oktobro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XII°


Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XX°

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

JAPANIO EN LA FANDUJO

Same kiel la Proksima Oriento rigardas Eŭropon per admirantaj okuloj kun la intenco pli kaj pli imiti la tiean socian kaj ekonomian vivon, la Malproksima Oriento sin turnas al Usono kiel al modelo kopiinda. « Progreso » estas, po ajna prezo, la celo kaj multjarcentajn moralon kaj moraron, specialan artstilon, ĉion oni ĵetas en la rubkorbon interŝanĝe de aliaj moroj, etiko kaj arto, kiuj ofte malsuperas la anstataŭitan.

Kompreneble, en periodo de ŝanĝo, restas ĉiam ankoraŭ multe el la malnova, kiel inter homaro, la centjaruloj ekzistas kune kun la nov-naskitoj. Sed en Japanio la ŝanĝo okazis tiom rapide, ke jam en la grandaj urboj la nova superas la antikvan. Japano, kiu lastjare edziĝis kun eŭropana konatulino mia, avertis kaj sendubigis ŝin samtempe: « Ne timu — li diris — veni en Japanion, ĉar tie vi trovos multajn eŭrop-kaj usonaninojn inter la edzinoj de miaj amikoj, sed... ne maliluziiĝu trovante Japanion tre usonsimila ». Mi ricevis kelkajn ĵurnalojn de japana SAT-ano kaj ili montris trafege la tendencon alusonan; ne nur ili estis presitaj parte anglalingve, sed la bildoj mem kaj ties arangmaniero certe ne havis ion komunan kun antaŭaj ideoj pri japania presaĵo; oni en ili vidis portretojn de ge-aktoroj, « belec »-bildojn, arojn da parlamentanoj kaj gemoŝtuloj — nur la vizaĝoj diferencis — kaj ĉeestis ŝerc-paĝoj, en kiuj estis bilditaj ne japanoj, sed la usonigitaj irlandanoj, kiuj donas al la usonaj ĵurnaloj ŝajne senliman fonton por ŝercado.



LA « MARUNUĈI » KONSTRUO, TOKIO

En Japanio estas por ĵurnaloj granda legantaro; la « Osaka Mainiĉi » vendas po pli ol 1.000.000 ekzemplerojn, signo samtempe de la nuna alfabeteco de l' popolo kaj de la negoc-kapablo de la ĵurnalistaj metodoj; ne mankas ankaŭ severa cenzurado, kiu malaperigas ofte « nedezirindan » novaĵon. Do, ĉio konformas al la okcidenta modelo!

Ĉiu povas scii nun, se nur pere de la kinematografo, kiel iom post iom la nacia vestaĵo de Japanio estas delasita; vojaĝanto en la Malproksima Oriento povas rimarki, ke la alpreno de okcidenta vestaĵo multe pli oftas ĉe la japanoj ol ĉe la ĉinoj: en Tokio eĉ ekzistas publika statuo de famulo vestita eŭropmaniere. Kaj la ĉinoj estas sur la sama vojo, kiel la birmanoj (pri « franca » teritorio kaj Malajio mi ne povas paroli); nur ili sekvas, anstataŭ gvidi.

La domoj de japaniaj grandurboj nun estas konstruataj laŭ usonaj aŭ eŭropaj modeloj; ferbetonaj domegoj aperas, anstataŭantaj la malnovajn tiom malsimilajn. La 8-etaĝa Marunuĉi-Domo en Tokio estas la plej granda oficeja konstruo orienta de Suez; do, Japanio ĉi-rilate preterkuris la britojn! Kompreneble, flanke de ĉi-tiuj gigantaj domaroj ekzistas dometoj el ligno, en kiuj loĝas la plej granda parto el la loĝantaro — la laboristaro — sed ĉu ĉi-tiu kontrasto ne pli substrekas la fakton, ke Japanio ĝisfunde imitas la okcidentulojn?

Kie oni trovas kune la kapitalistaj kaj laboristaj domoj, sekvas, ke oni ankaŭ trovas industrion, komercon

kaj financon de la plej moderna speco. Enirinte Osaka'n, oni povus imagi, ke oni estas en Anglio, alproksimiĝante Manchester'on, ĉar ankaŭ en Osaka, la komerca ĉefurbo de Japanio, unu el la plej grandaj urboj en la mondo, la aero estas plena de nigraĵo kaj centoj da fumigemaj kamentuboj malbeligas la lokon, La simileco estas videbla plue se oni vizitas la kotonmuelejojn —ĉeestas aroj da virinoj, sed japanvizaĝaj anstataŭ kun la fizionomioj de Lancashire. Ili grandparte loĝas ĉe la muelejoj, kaj ofte la dormĉambraro estas bonege aranĝita, sed... la salajroj estas tre malaltaj. Nuntempe pli kaj pli invadas industrion la virinoj; ili eĉ karb-ŝarĝas ŝipojn. Jen libereco kaj progreso por ili!

En la stratoj de Osaka kaj alíaj grandaj japaniaj urboj, pli kaj pli la «ĝin-rikŝoj» (1) malaperas, pli kaj pli multnombriĝas tramoj, omnibusoj kaj ĉiaspecaj aŭtomobiloj. En la domoj oni vidas ankaŭ ŝanĝon; la burĝoj lasas la manĝ-bastonetojn kaj alprenas okcidentan manĝilaron, anstataŭas dorm-tapiŝetojn per litoj kaj antikvan nacian meblaron per ĝis-dataj usonaj modeloj, kiel taŭgas en modern-stilaj konstruoj.

Ĉiu, kiu vizitis dum la lastaj jaroj ekspoziciojn, en kiuj ĉeestis japanaj bildoj kaj aliaj artaĵoj, devis esti trafata de la ĉiam kreskanta emo elmontrita maljapanigi la artajn modojn kaj metodojn. Unue oni povis rimarki, ke ekzistas ia stilo *inter* la japana kaj la okcidenta, kvazaŭ japana vizaĝo en okcidenta ĉapelo; sed nun, kiam studas en Paris kaj aliaj eŭropaj urboj la japanaj artistoj tiom ofte kiom alilanduloj; kiam la vivado en Japanio mem estas saturita de usoneco, ĉu povas pli daŭri tiu speciala stilo, kiun oni ŝatis en Eŭropo kiel ion apartan, strangan, kvankam belan kaj eĉ influan? La arto ĝenerale spegulas la ĉirkaŭantan vivon kaj artistoj bezonas vidi antaŭ ol pentri. Ĉu oni povas vidi nun en Osaka cikoniojn kaj delikatajn arbojn kaj florojn? Ĉu oni facile povas bildigi kutimojn kaj metiojn ne plu ekzistantajn? Eble baldaŭ la muzeoj estos la solaj ujoj por «japana arto».

(1) Vidu n-ron 108 de *Sennaciulo*.

Do, ni legu la verkojn de Pierre Loti, de Lafcadio Hearn kaj aliaj verkintoj pri Japanio, sed ni metu ilin en la saman vicon kiel la mezepokajn eŭropajn romanojn; nepre ni ne atendu, ke en Japanio, almenaŭ en la urboj, ni nuntempe renkontu similajn popolon kaj okazantaĵojn, kiaj ĉarmas nin en la libroj. La japanoj laciĝis pri la rolo nur de ĉarmuloj kaj ili sin ĵetis en la dramon de reala malbela kapitalismo, ĉar ili vidis en tio progreson kaj egalecon.

Ĉu ili pravis? Tio estas alia demando. Dume ni konstatas la fakton.

Kvankam por ni mem bedaŭrante la perdon de graciaj eksteraĵoj, de interesaj malsimilaĵoj, ni kontentas, ke la *japanaj laboristoj* partoprenas la gravegan ŝanĝon; ni konstatas ke ĝi pretigas ilin por la tago de laborista regado; ni komprenas, ke ju pli multe industriiĝas la mondo, des pli baldaŭ ni vidos mond-revolucion, kaj ni scias, ke revolucio ne mond-skala povas esti nur nematura frukto.

Pri "La Bellevilloise"

Sendube interesos la K-dojn iomete ekscii pri la proleta Konsum-Kooperativo kiu ŝirmas la sidejon de nia Asocio, kaj nin helpas per ĉiujara subvencio.

«La Bellevilloise» (elp. Belviluaz, derivas el «Belleville», nomo de pariza kvartalo) jubileos baldaŭ sian jarkvindekon. Ja, en januaro 1877, 18 mekanikistoj kaj 2 ŝuistoj kolektas 100 frankojn kaj instalas la unuan butikon (oni memoru ke, en 1831, la 28 pioniroj de Rochdale (Roĉdal) Anglio, kolektis 700 fr.). La unuan tagon, la vendado produktas 111,90 fr. — la duan tagon 35,60 fr. Dum la dua semajno duobliĝas la enspezado. Dum la tuta jaro, 14.875,15 fr. (la Rochdal'anoj finis la jaron kun 17.750 fr.). La negocado daŭre pliiĝas, — mankas spaco, — oni luas ejon por loki ĉevalon kaj veturilon. Februare 1885, oni dungas la unuan salajratan oficulon. Filioj kvartalaj kreiĝas, kio multon kostas, — oni konstruas kelon, panbakejon, karbejon ktp. 10 jarojn post la fondo, la konstruoj valoras kune 63.000 fr. En 1889, la jara spezcifero atingas 2 milionojn da fr. kun 3.000 asocianoj. De tiam firma estas la entrepreno, kiu rezistas je ĉiuj skuoj ekonomiaj kaj internaj. En 1897, ĝi aĉetas terspacojn: ĝia spezo jara estas 4 1/2 milionoj; la rezervo mona: 110.000 fr. — Jam 180.000 fr, jare estas rembursataj al la vendantoj.

Ĉirkaŭ 1898, interna krizo. Grava danĝero: spekulaciemaj, monavidemaj elementoj enŝteliĝis en la Administracia Komitato. Uzurpo, rabo, ŝtelo, korupto, ĉio baris la normalan funkcion de l'entrepreno, — kaj en 2 jaroj, 3.000 anoj forlasas la Kooperativon, kies jara spezo falas de 4 1/2 ĝis 2 milionoj.

En 1899, revekiĝo kaj ariĝo de la «honestuloj», Fondo de «Grupo de Kooperativistoj» sub kies puŝo la kulpa Administrantaro forir-as. Ree, la Kooperativo progresas. Tamen malfacilaj, penigaj estas la unuaj monatoj. Dank' al bonvolaj monhelpoj, savo okazas.

Tuj, profunda reformo: la varojn oni aĉetas ne plu al privataj komercistoj, sed kiel eble al Produkt-Kooperativoj (ŝuoj, ĉokolado ktp.). Unu Delegito vizitas la angliajn Kooperativojn. Oni komencas novan politikon rilate al la laborista klaso: kreo de apoteko, flegejo, subvencioj al strikantoj, pano kaj lakto senpaga al la strikantoj, anoj de la Kooperativo, kaj ĉefe fondo de Popola Universitato.

Tiu P.U. konsistas nun el la jenaj fakoj: ampleksa biblioteko (senpaga prunto), edukaj konferencoj, sportaj kluboj, teatro, muzikistaro, kantistaro, infano-grupo, esperanto-grupo ktp. Al ĉiu fako, la «Bellevilloise» donacas ĉiujare monsubvencion. Dumvintre okazas diversaj kursoj, inter kiuj esperanto-kurso.

Kaj nuntempe oni konstruas vastan Popoldomon, kie ĉiu fako posedos sian apartan ĉambron por instali sian sidejon kaj teni siajn kunsidojn.

Koncize: 18.000 anoj, 38 filioj en unu Pariz'a kvartalo, 20 milionoj da fr. jarspezoj, admirindaj sociaj fondaĵoj... jen la nunaj idoj de la unua butiko de 1877. Kaj ĉi-ĉio kunformas revolucian fokuson, kvazaŭ fortikaĵon de la Pariza proletaro.

SAT firme radikas en tiu laborista kampo.

SAT-ano 11.

La socia kaj jura problemo de la edzeco en Sovetio

Dum la lasta kunsido de la Tutruslanda Ekzekutiva Komitato, estis pridiskutata la reformo de la leĝo pri edziĝo kaj familio. Pro la multaj debatoj, kiujn ĝi estigis, la konfirmo de la leĝo estis prokrastata ĝis la venonta kunsido, por dum tiu ĉi tempo pli profunde esplori la demandon. Kvankam ne mondproblemo, ĝi tamen estas sufiĉe interesa, por ke estu ankaŭ priparolita sur la paĝoj de SENNACIULO.

Antaŭ la revolucio, Rusio estis unu el la plej reakciaj ŝtatoj rilate al la edziĝleĝoj. Post la oktobra revolucio la eklezia edziĝo de la jura vidpunkto estis nuligata kaj jurajn sekvojn donis nur civila edziĝo. La nova leĝo donis al edziĝo karakteron de libera unuiĝo de du personoj kun absolute egalaj rajtoj kaj ankaŭ devoj. Ne nur la edzo estas devigata doni vivrimedojn al sia edzino, sed ankaŭ la lasta devas subteni la senlaboran aŭ nelaborkapablan edzon; ili havas egalajn rajtojn al kune akirita havaĵo. Post eksedziĝo ili dividas la havaĵon, kaj la patro estas devigata subteni la infanojn kaj ankaŭ la eksedzinon se ŝi ne estas laborkapabla. Tiu ĉi lasta punkto estas precipe grava por vilaĝ-

aninoj. Ofte okazas, ke vilaĝanoj, bezonante dum la rikoltsezono pluajn laborfortojn, anstataŭ dungi laboristojn kaj pagi al ili laŭleĝajn rekompencojn kaj sociasekuradon, preferas simple edzinigi laboristinon por, ekspluatinte ŝin ekster ia mezuro, forpeli ŝin sen ia rekompenco kiam la sezono pasis. Defendante tiele la pli malfortan parton, la nova leĝo aliflanke fariĝas ofte kaŭzo por trouzo kaj friponagoj flanke de virinoj. Similajn plendojn de viroj ni jam legis en SENNACIULO. Kiom seriozaj estas tiuj plendoj ni analizos poste. Tie ĉi mi volas ankoraŭ rimarki, ke malnova revolucia leĝo ĝenerale ne solvis la socian problemon pri la edziĝo. Montriĝis, ke ekster la leĝo restis granda kvanto da edzecaj rilatoj, sed kiuj ne estas regulitaj kaj sekve de tio ne defendataj de la leĝo nur pro tio, ke tiuj ĉi rilatoj ne estas registritaj. Ĉar por la registaro la registrado estas principe indiferenta, ĉar ĝia ĉefa celo estas en edziĝo, same kiel en aliaj sferoj de la socia vivo, helpi al la malpli forta parto, do ekstaris la problemo: se viro vivas en neregistrita edziĝo kaj forlasas la virinon gravedan aŭ kun infano, ĉu ŝi ne rajtas postuli de li subtenon nur pro tio, ke la edziĝo ne estis registrita? Ĉu tio ĉi ne donas al la viro oportunan okazon malĉasti, havi kelkajn edzinojn, portante tamen neniajn respondecon kaj devojn. Kaj aliflanke: se la leĝo faros nenian diferencon inter edziĝo kaj simpla kunvidado, ĉu ne ricevos tiam la virino la eblecon ĉiam ŝanĝi siajn kunulojn kaj de ĉiu postuli subtenon? Kaj ĝenerale, ĉu ekzistos tiam edziĝo en jura kompreno? Ni vidas kiel komplika estas la problemo. Por decidi ni devas analizi la realan vivon.

Ĉu granda procento estas da neregistritaj edziĝoj? Estas neeble tion kontroli statistike, sed la kvanto de tiuj ĉi unuiĝoj estas sendube tre granda. Kio do estas la kaŭzoj de tiuj interligoj en lando kie laŭleĝa edziĝo estas plej facile plenumebla? Antaŭ ĉio, la plej grandan procenton da tiaj unuiĝoj konsistigas homoj, el kiuj unu aŭ ambaŭ jam estas en registrita edzeco, sekve multedzeco. Kiaj motivoj — ĉu soci-ekonomiaj aŭ eble fiziologiaj — klarigas ĉi fenomenon?

La fakto, ke en neniu soci-ekonomia epoko reale ekzistis pura monogamio pruvas, ke ne la ekonomia ordo estas la ĉefa kaj sola kaŭzo. Pli nature estas serĉi la kaŭzon en fiziologiaj postuloj de homo. Ni vidas, ke ĉiuj fiziologiaj postuloj celas al kiel eble plej plena kaj diversflanka kontentigo? Same ankaŭ la seksaj bezonoj. Kompreneble, la fenomeno, pri kiu ni parolas, ne apartenas al tiu bezonoj, kies nekontentigo minacas al la normala funkciado de la homo, kiel ekzemple la seksaj bezonoj ĝenerale.

Tiaj postuloj estas fiziologiaj luksaĵoj, enkorpigitaj en la socia vivo pere de ĉiama kutimo, kaj havantaj en burĝa socio apartan logon, kiel ĉiu malpermesata frukto. Sed tiaj interrilatoj de du seksoj kies kaŭzo estas simplà amaventuro, ne povas interesi leĝdonantojn.

Ni prenu la duan kategorion de homoj, kiuj vivas en neleĝaj edziĝoj. Iaj intimaj, ofte tre noblaj kaŭzoj malpermesas al ili rompi la malnovan edziĝon. Ankaŭ tiu ĉi kategorio ne bezonas la enmikson de la leĝo. Restas la lasta kategorio, la plej ofta, kies diversflankecon oni povas redukti al jenaj okazoj: 1) Virinoj kiuj sincere amas, vidas en interligo efektivan edziĝon, sed akceptas ne registritan kuniĝon, ĉar laŭleĝan rifuzas la viroj. 2) Forlogitaj kaj diversmaniere trompitaj aŭ perfortitaj. Evidente estas, ke tiuj ĉi du lastaj kategorioj nepre bezonas defendon de la leĝo. Precipe pro tio ĉar tiaj eksteredziĝaj interrilatoj estas la plej mallongdaŭraj kaj en tiaj okazoj la virinoj ofte estas forlasataj en plej mizeraj cirkonstancoj sen ia materiala subteno. Kiaj motivoj do povas ekzisti por ne krei leĝon, kiu defendos tiajn suferantinojn? La motivo, ke tio nuligas la juran komprenon pri edziĝo ĝenerale, ne estas tiom serioza, por ĝin refuti. La reala vivo estas multe pli valora ol ĉiuj juraj institucioj kaj kombinoj. Plue, oni timas, ke tiu leĝo kaŭzos multedziĝon. Sed fakte ne leĝo kreos multedziĝon, sed ĉar ĉi tiu multedzigo estas tre ofte fakto, estas necese krei leĝon, kiu regulos tiajn interilatojn. Oni diras ankoraŭ, ke virinoj fariĝos tiam pli atingeblaj, pligrandiĝos la malĉastemo kaj ebliĝos ankaŭ la ĉantaĝo (1) flanke de virinoj. Tia danĝero ekzistas kaj ĉefe pro tio, ke nur malgranda parto de virinoj, kiuj efektive bezonas defendon uzos siajn rajtojn. Iuj pro sinĝeneco, aliuj pro nedeziro konigi siajn interrilatojn ktp... Oni povas eĉ certigi, ke la plej senĝenaj kaj senskrupulaj ĝuos la profitojn de la nova leĝo.

Sed ĉu la supozo, ke ne ĉiuj, kiuj tion indos, uzos la leĝon, sufiĉas por ĝin ne eldoni. Ĉu ĝia ekzisto mem ne efikos psikologie ankaŭ sur la viroj, kiuj fariĝos eble iomete pli prudentaj kaj singardaj, konsciante sian respondecon, kaj ne tiel volonte kaj rapide partoprenos amaventurojn. Konklude, la projektita leĝo celas ne sankcii la liberajn interligojn, sed fiksi ilian respondecon. Ĉu estas necese, batali kontraŭ tiaj interrilatoj? Sendube. Tamen en similaj okazoj leĝo estas malbona batalilo. Racia edukado, sana sporto, riĉa mensa laboro kaj ĉefe *socia malaprobo*, jen kio kapablas ŝanĝi la karakteron de seksaj interrilatoj. En nia socio tio estas efektivigebla nur parte. Nur en rekonstruita socio, kie estos nek materiala mizero, nek senzorgatoj, kie ĉiu infano fariĝos objekto de socia zorgado, la homoj ŝanĝos ankaŭ la karakteron de siaj seksaj interrilatoj. Ne interesoj, sed sentoj kunligos tiam la homojn; ne malĉasteco, sed amo fariĝos fundamento de interseksa kunligo. Kaj tiam... forestos la leĝoj.

S. LIZIĈNIK *(3132)*.

(1) Ĉu aprobinda vorto? Ĝi signifas monpostulado per skandalminacoj.

Por povi daŭre liveri SENNACIULO-n por la nuna treege malalta prezo, kompare kun aliaj esperantaj gazetoj, ni bezonis 1000 pliajn abonantojn.

Ĝis nun ni varbis nur 323. — Mankas do 677.

Ne malvigliĝu la *aktivaj* SAT-anoj.

La jubileo-ĉeno de SAT

K-dino FRIDA NOEL (Paris), fr. 25, alvokas la K-dojn el Schweidnitz je la nomo de la karmemora K-do PAUL FRANTZ (309) pioniro de la SAT-movado en Schw. Ili same alvoku alian grupon.

— K-do J. LAQUET (Le Cheylard), fr. 5.

— GRUPO « ST-ETIENNE », fr. 10.

— ELZE (Halle), 2 m. — DUINKER (Den Burg), 2,50 guld.

— PAUTZSCH (Heidenau), 5 mk. kaj alvokas la SAT-anojn en Dresden.

— ALBANOV (Arkadak), 1 rubl. kaj alvokas K-dojn el Esp. Sekcio de O. D. R., Saratov, Efimov (Omsk) kaj Grafov (Pjatigorsk).

— KOROLEV VLADIMIR, 2 rubl.

— DEMIDJUK (Moskvo), 2 rubl., invitas sian malnovan amikon kaj SAT-K-don P. GEDAI (patro) (Halle a. S.) kaj kunlaborantojn de « S. R. ».

— ĴAROV (Bogorodsk), 1.62 rubl., alvokas STRIĴAK, SPIRIDOVIĈ kaj POGORELOV el Ĥarkov.

— BAĴENOV (Ĉita), 2 rubl., invitas la SAT-anojn el Habarovsk, Blagoveŝĉensk kaj Vladivostok por donaci.

— HEJDA (Wien), 1 ŝil. aŭstr. — HOOGERVORST (Aalsmeer), 2,50 fl. — HARMSEN (Aalsmeer), 2 fl. — MAARSEN (Aalsmeer), 0,50 fl. — WARRINK (Enschede), 2,50 fl. — K-dino S. VAN SLEE (Hago), 2,50 fl. — KASPAREK (Decazerville), 6,25 fr.fr.

— SOKOLOV kaj KOBLOV (Taŝkent), 2 rubl., alvokas K-don DREZEN (1518), KOVALEVSKI (3560), ĤOVES (4175), BOEV (4358), FIELDING (1242), SPÄTH (4204).

— R. LEHMANN (Dresden), kiel senlaborulo mi donacas 0,50 mk.

— DEPIERRAZ (Rolle), 5 fr. svis., alvokas ĉiujn kontraŭ-alkoholulojn helpadi.

— VINCENT (Paris), 10 fr. fr.

— K-do EDV. MEDIŜAUSKAS (Kietaviŝkis, Litovio), donacas 5 lidojn kaj alvokas al K-dinoj ELLI BERGMANN (Dresden), MARINA SERGIEVSKAJA, NATALIO TALANTOVA (Iv. Voznezensk) kaj al K-doj KARL OPPITZ (Berlin), KARL GÖTZE (Altenburg), GEORG KUĜELEV (Smolensk), PAUL THOMAS (Freiburg), GEORG WEBER (Mainz), KADZUVO TAVA (Ĥarbin), C. APRESIANC (Leninakau, Armenio), ALF. BERNOLDT (Wittgensdorf), H. WALDMANN (Feuerbach ĉe Stuttgart), W. JUBEL (Crimitschau), G. RAUPACH (Burkhardsdorf) kaj al aliaj siaj gekorespondantoj el la tuta mondo, ke ili forĝu pluen la nerompeblan Jubileo-ĉenon!

— K-do B. PERELSTEIN (3940), alvokas ĉiujn novajn SAT-anojn, ke ili kompletigu sian kotizon tiele, ke ili estu pagintaj la saman sumon kiel la unuaj SAT-pioniroj. Tial mi sendas 1,5 rublon por la du jaroj dum kiuj mi ne estis en nia tiom subteninda SAT.

— K-do EŬTRAPEL (Ie), 1 dolaron kaj alvokas al K-do JURYSTA, ke li bonvolu ne forgesi, ke ĉiam agoj parolas pli klare ol vortoj.

KIU DONACON PRENAS,
TIU SIN KATENAS.

(El la *Zamenhofa Proverbaro.*)

Francisko Ferrer

Antaŭ deksep jaroj estis pafmortigita de la Hispania reakcio unu el la plej bonaj porbatalantoj de nova epoko: Francisko Ferrer. Ferrer estis la kreinto de « modernaj » lernejoj en Hispanio. Tiuj lernejoj kaŭzis novan progreseman spiritostaton en la junularo, spiritostaton kiu estis tro danĝera por la regantoj kaj pro tio oni mortigis la kreinton de ĝi. La legolibro de Ferrer kiu en mallonga tempo estis eldonita en dekmiloj da ekzempleroj estis trasorbita de spirito, kiu devis eduke fari la infanojn klasbatalantoj.

« La patriotismo, la kapitalismo kaj religio estas reto, kiu sufokas la personecon de la homo ». Tiaj estis la vortoj kiujn Ferrer parolis al la junularo.


FRANCISKO FERRER

Kiam, en la jaro 1909, la laboristoj de Barcelona ribelis, ĉar ili preferis sur la strataj barikadoj morti ol vivaĉi por la profito de la Hispaniaj akciuloj, la reakcio opiniis, ke nun estas la ĝusta momento por seniĝi je Ferrer. Tuj post la subpremo de la ribelo oni arestis la malamiton kaj militjuĝistaro kondamnis la senkulpulon al morto, kvankam li eĉ ne estis dum la tempo de la ribelo en Barcelono. La 13-an de oktobro 1909 Ferrer estis mortpafita. Sed same kiel dum sia tuta vivo, vivo plena de batalo por justeco kaj libereco, li ankaŭ ne tremis dum tiuj lastaj momentoj. La lastaj vortoj kiujn li vokis al la soldatoj estis: « Celu bone, miaj infanoj, vi estas senkulpaj, vivu la moderna instruado ». Ferrer oni povis mortigi, sed lia spirito vivas daŭre. Novaj batalantoj portas lian ideon.

Sed ankoraŭ regas en Hispanio la samaj fortoj, jezuitoj, ekleziularo kaj reakcio, kiuj fimortigis Ferrer'on. Sed tamen por ili alvenos la horo venĝa.

M. Sc.

Ni jam diris kaj ripetas, ke nur la Redakcio de SENNACIULO sidas en Paris. Nenio ŝanĝiĝis ĉe la Administracio. Sekve, oni sendu senpere al K-do Lerchner (Colmstrasse 1, Leipzig-O-27) ĉion rilatan al abonoj, reabonoj, adresŝanĝoj, kotizoj, libromendoj.

EKZEKUTIVA KOMITATO.

Ĉu vi jam forsendis la statistikan materialon? Se ne, pripensu, ke estas honora devo, fari tion tuj kaj senprokraste.

(Komparu artikolon en n-ro 108.)

☆ DISKUTEJO ☆

Ĉu Marks eraris?

(Daŭrigo [1])

La ŝajna « malcentralizo » en Usono.

En Usono, laboristoj fariĝis posedantoj de akcioj; ili tiel fariĝis kvazaŭ kun posedantoj de kapitalistaj entreprenoj, ili fariĝis kapitalistoj. Anstataŭ klasbatalo, socia harmonio kaj paca kunlaborado de entreprenistoj kaj laboruloj ŝajnas konduki la proletaron el la mizero al la ĝuado de ĉiaj plezuroj, ĝis nun rezervitaj al la burĝaro.

Sed, fakte, la akciuloj proletaj tute ne « posedas » la entreprenon, kies akciojn ili tenas en la mano. En la antaŭa artikolo, citante la opinion de Marks pri akcientreprenoj, pri la funkcio de l' kredito (aĉetante akciojn, la aĉetantoj ja donas *krediton* al la entrepreno), ni montris, ke tio ne estas malcentralizo de kapitalo, sed kontraŭe, mobilizado de ĉiuj kapitaleroj de la socio, eĉ de la plej malgrandaj, en la manoj de malgranda nombro da personoj, kiuj sukcesas tiel, disponi laŭ siaj bontrovo kaj intereso ne nur pri sia propra havaĵo, sed eĉ pri gigantaj sumoj, al ili tute ne apartenantaj. La sperto montris, ke ĝenerale sufiĉas posedi 30 ĝis 40 procentoj de la akcioj de iu entrepreno, por ĝin tute regi. Se tiuj 30 ĝis 40 procentoj estas koncentritaj en unu mano, la aliaj akciuloj, dissemitaj, sen komunaj volo nek organo, estas senpovaj kaj havas neniun influon sur la afergvidadon de la entrepreno. Akcio rajtigas sian posedanton, ricevi *dividendon;* sed tiu dividendo ne estas egala al entreprenista profito, sed nur al intereso (2), t. e. al sumo, kiun la akciulo ricevus ankaŭ se li pruntedonus sian monon alimaniere, ekz. ĝin metante en bankon. La entreprenista profito, la reala frukto de produktiva kapitalo, jam troviĝas sub formo de « fondintgajno » (3) en la poŝoj de la malmultaj financbienegoj (ordinare bankarestroj), kiuj fondis la entreprenon. Sekve la etakciuloj — kaj laboristoj ĉiam povas esti nur etakciuloj — ne estas pli kapitalistoj ol se ili metus siajn ŝparaĵojn en iun bankon aŭ ŝparkason. Krom tio, ekzistas la sistemo de tiel nomataj « ordinaraj » kaj « privilegiitaj » akcioj, kiu permesas al la plej riĉaj kapitalistoj, havigi al si la ekskluzivan influon. Rudolf Hilferding jam antaŭ 16 jaroj detruis la trompan ŝajnon de la potenco de etkapitalistoj per la jenaj vortoj:

« Ju pli la akcisistemo etendiĝas, des pli la kapitalista propraĵo fariĝis limigita propraĵo, donanta al la kapitalisto nuran rajton je ricevo de supervaloro, ne permesanta al li, enmiksiĝi decidige en funkciadon de la produktado. Sed tiu limigo samtempe donas al la havanto de la plimulto de la akcioj la absolutan regadon super la malplimulto, kaj tiel la propraĵo de la plej granda nombro de la etaj kapitalistoj estas pli kaj pli limigita, la absoluta dispono pri la produktado estas nuligata, la rondo de la produktad-estroj mallarĝiĝadas; la kapitalistoj formas societon, en kies direktadon la plej multo el ili neniel rajtas enmiksiĝi. La efektiva dispono pri la produktiva kapitalo apartenas al personoj, kiuj reale donis nur malgrandan parton ĝian » (4).

Ĉu do en Usono la kapitalo efektive malcentraliziĝas? Ke laboristoj havas, en favoraj cirkonstancoj, malgrandajn ŝparaĵojn, estas sufiĉe malnova fakto, kaj por tion malkovri, ne estis necese nemalkovri Amerikon. Estas nove nur, ke oni tiajn laboristojn nomas « Kapitalistoj ». Se laboristo havas ŝparaĵon en ŝparkaso aŭ en banko, li restas proleto; sed se li aĉetas akcion per tiu sama mono, li fariĝas kapitalisto, laŭ la diroj de la burĝaj profesoroj, kaj la kapitalo tuj « malcentraliziĝas ». Samprave mi rajtus diri, ke la redaktoro de la ĵurnalo « Le Temps », kiu volis mortigi la marksismon per la usonaj ciferoj, estas neŝanĝebla azeno en sia redaktejo, sed ke li fariĝas geniulo en la borsaj salonegoj de Ameriko.

Ni sekve vidas, ke la kapitalistiĝo de la la usonaj laboristoj kaj la « malcentralizo » de kapitalo estas nur ekstera ŝajno. Sed alia demando al ni ŝajnas pli grava. En Eŭropo, la laboruloj jam delonge ne sukcesas « ŝpari ». Eĉ en Anglio, kies proletaro estis la plej bone vivanta, la laboristaro nun devas konduki senkomparan bataladon por defendi almenaŭ parte sian antaŭan vivnivelon. Kaj tiel venas al ni demando, kiamaniere la usona proletaro sukcesas aĉeti akciojn, pli alligi tiomgrade sian vivnivelon kaj tiel krei la ŝajnon de « kapitalistiĝo ».

Ni jam klarigis, en antaŭa artikolo, la kaŭzon de tiu stranga fenomeno: Usono okupas nun en la mondekonomio la monopolan pozicion, kiun okupis Britio ĝis la fino de la pasinta jarcento. La usona burĝaro, ricevante, dank' al tiu monopolo, grandegajn superprofitojn, povas doni al la kvalifikita parto de sia proletaro salajron multe pli altajn ol la meza nivelo. Tiu tendenco estas ankoraŭ pli akcentata pro la komuna agado de la usona kapitalistaro kaj de la organizaĵo de la privilegiitaj laboristoj, A. F. L. (Amerika Federacio de Laboro) kontraŭ troa enmigrado de eŭropaj kaj ĝenerale eksterlandaj laboristoj; tiel, la propono de laborforto kvalifikita restas limigita kaj ĝia prezo ne povas tro fali; nur akra krizo, kreanta grandan armeon da senlaboruloj, povos malaltigi tiujn salajrojn. Kaj finfine, ĝis antaŭnelonge, la laboristoj ne trovantaj laboron en la industrio, trovis antaŭ si larĝan eblecon por serĉi novan ekzistadon en la vasta lando kiel kampkulturistoj. *En la lando de mondmerkata monopolo, la laborista aristokratio havas do specialan, duoblan monopolon* (malhelpo al enmigrado kaj kulturebleco de vasta grundo en kazo de industria krizo), por plibonigi sian situacion per limigo de la konkureco sur la labormerkato. Krom tio, oni ne forgesu, en kiu mizerega situacio troviĝas la granda amaso da nekvalifikitaj laboruloj (ĉefe enmigrintoj el suda kaj orienta Eŭropo) kaj la negroj. Tiuj laboristoj ne havas la eblon por ŝpari kaj por fariĝi akciuloj. Politike kaj ekonomie ili estas en teruraj kondiĉoj. Sur ilia dorso la Gompers'a (1) laboristarero ĝuas la plezurojn de privilegiuloj.

(Daŭrigota.)

(1) Vidu la n-rojn 99, 102, 103, 104, 105, 106, 107.

(2) Vidu, rilate tiun esprimon, la rubrikon « Lingvaj demandoj », punkto 3, en « S-ulo » n-ro 105.

(3) Se iuj K-doj deziras, mi en speciala artikolo pli detale klarigos tiun fenomenon. K-doj jam iom spertaj en ekonomiaj demandoj povos legi tiurilate en « Financa Kapitalo » de R. Hilferding la 1-an parton de la 7-a ĉapitro.

(4) « Financa Kapitalo », ĉap. VII, 3.

(1) Samuel Gompers estis la ĉefo de A.F.L. Li estis burĝa laboristgvidanto, aĉetita de la kapitalistoj; kontraŭ batalis la Amsterdaman Sindikatinternacion, ĉar ĝi al li ŝajnis esti tro ruĝa.

(2) La nacia riĉaĵo de Usono estis, laŭ oficialaj ciferoj, 320 miliardoj da dolaroj, en 1922.

Ĵus aperis:

ŜTATO KAJ REVOLUCIO

de N. LENIN

150 paĝoj, formato 12×18. Prezo: 1 mk. g.

★

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT Colmstrasse 1-III, Leipzig-O-27

JUNULARA PAĜO

Jen unuafoje ni, kiel rezulto de niaj decidoj en Leningrada SAT-kongreso, eldonas kiel junaj SAT-anoj propran paĝon ĉe Sennaciulo! Ni ne dediĉu longan antaŭparolon al ĝi, konsiderante la ŝpareman eluzuzon de la loko al ni disponigata. Ni nur esprimu unu nian tre fortan deziron, ke ĝian redaktadon partoprenu plej multaj kaj multnombraj el junuleca kamaradaro organizita ĉe SAT, kaj — por plilarĝigi kaj pliinteresigi nian junular-paĝan enhavon — ke ne nur junuloj, sed eĉ estontaj junuloj, la geknaboj en niaj vicoj (ni scias, ke ili ekzistas!), skribu siajn artikoletojn por nia paĝo!

Sed plue. Per tio la valoro de nia paĝo ne jam estas elĉerpita. Ĉiu el ni ne forgesu unu gravan taskon: utiligi la enpresitajn artikolojn por sia gazetaro. Ni zorgos, ke enpresotaj artikoloj havu intereson por tutmonda junularo, kaj ke tiamaniere nenia redakcio malakceptos niajn tradukojn. Tiel procedante, interalie, ni ŝparos al ni multajn individuajn penojn kaj klopodojn: sendi al tiu aŭ alia gazeto specialajn raportojn. Sendante tiajn raportojn al nia paĝo, ni atingigos ilin komune ĉiujn interesatajn gazetojn, kaj ne nur unu hazarde preferatan.

Ni menciu ekzemple, ke K-do Barthelmess ricevis de multaj sovetiaj K-doj la peton, skribi specialan artikolon por ilia junulara gazeto, verki pri tiu aŭ alia temo, fariĝi konstanta korespondanto ktp. Jes, en unu aŭ du okazoj li eble povus plenumi tiujn petojn, sed — ĉu tio estas ebla, se el kvindeko aŭ pli da lokoj alvenadas tiaj petoj? Tial ni konsilas al la petantoj, unuavice utiligi la enhavon de nia laŭeble regule aperonta « Junulara Paĝo », kaj due akceli la interligiĝon kun eksterlandaj junular-organizaĵoj, por ke ili kolektive verku kaj sendu la raportojn deziratajn de l' gazetaro. Pripensu kaj agu laŭ tio!

JUNULARA SEKCIO DE SAT.

★

LA PROBLEMO DE LA GVIDANTOJ DE INFANOJ

Kiuj inter ni vizitis Sovet-Union, okaze de la sesa Kongreso (parolante pri okcidentlandaj K-doj), tiuj havos tre fortan impreson pri la prosperado kaj bon-organiziteco de l' junpionira (t. e. infana) movado en USSR, movado, kiu ampleksas 2 milionojn da infanoj kaj tamen ĝis lasta ĉenero estas finorganizita, en kiu funkcias sendifekte ĉiu ero kaj ĉiu parteto, komencante de oktobrida ĉenero kaj irante de taĉmento al taĉmento ĝis granda ĉeuzina pionira « bazo » gvidantara stabo.

Se oni konsideras la diversajn kvalitojn de tiu movado, oni ankaŭ rimarkas, kian tre gravan rolon ludas la problemo de gvidantoj por la infanoj. Ni nur bezonas rigardi nian okcidentlandan pionir-movadon, kaj kompari, por ekkoni, kial malprosperas ofte ĉe ni la grupoj de pioniroj. Certe oni ne malprave atentigas, ke en Okcident-Eŭropo la potencrilatoj kondiĉas la malfacilan evoluon de niaj grupoj, sed krome (nunmomente flankenmetante tiun fakton) havas plej gravan signifon kaj influon je prospero de la infanaj grupoj la rolo de l' gvidanto. Ni vidas, ke ofte la maltaŭgaj personoj gvidas kaj fuŝas. Sekvo tuja estas, ne nur, ke la infanoj perdas la intereson, kiun oni ne komprenas veki kaj vigligi, sed krome, ke la gepatroj de l' infanoj perdas la konfidon al la gvidanto, timas plimalpli prave malutilon por siaj infanoj kaj eltiras ilin el la grupo.

Mi ne bezonas esplori, kial la gvidantara problemo tiom bone estas solvita en Sovet-Unio. Estas klare, ke tia forta junular-organizaĵo, kia la KJSU, povas elimini sufiĉon da kapablaj kaj lertaj, pedagogtalentaj fortoj. Krome ja tiuj K-doj estas pedagog-klerigataj en apartaj kursoj kaj taŭgigataj por sia funkcio. Ĉio tio mankas en Okcidento. Aŭ, nur la radikoj ekestas por la gvidantedukaj kursoj.

Mi diru kelkajn vortojn pri Germanio. Mi supozas, ke ĉiuj konsentas, ke nur junularo mem estas kompetenta, por gvidi la infangrupojn. Montriĝis plej taŭgaj laŭspirite kaj laŭnature kiel gvidantoj tiuj junuloj, kiuj mem jam elkreskis el la infanmovado, mem jam estis infane organizitaj kiel pioniroj. La pioniroj ja estas la anstataŭantoj en estonto de la junularo. Pri tio do ne povas ekzisti eubo, ke gvido kaj aŭtoritato pri la infangrupoj devas kuŝi ekskluzive ĉe la junularo. Sed nun en la praktiko montriĝas la baroj kaj malfacilaĵoj. Inter la junularo regas tiu progresema kaj atakema spirito, kiu distingas la jarojn de junulperiodo. Junularo direktas sin kun siaj tutaj nervoj kaj interesoj al batalo, al revolucia batalo. En ilia ideologio do nepre la sinokupo pri infanoj devas signifi, paŝon returnen, malprogreson. Kvankam ili ekkonas, ke infanoj, ilia anstataŭantaro, devas esti jam edukataj en revolucia pensmaniero, tamen ili mem ne kredas sin indaj, fari tion, ĉar ili konsideras alia sian taskaron. Tial tre malfacile estas en Germanio (kaj mi supozas ankaŭ ĉe aliaj okcidentlandaj junularoj), trovi la kapablajn gvidantojn por la infanoj. Kaj se ni rimarkas, ke jen tie subite bonege evoluas iu pionir-grupo, ni certe povas konkludi, ke tiu grupo posedas kapablan gvidanton-junulon. Kaj se ni aliflanke legas, ke iu grupo malkreskas aŭ eĉ likvidiĝas, ni same certe povas konkludi, ke tie la gvidanto pro iu kaŭzo devis forlasi sian grupon kaj anstataŭiĝis per malkapablulo. La plej grava manko, kiun montras kelkaj el niaj gvidantoj, estas tiu, ke ili malmemoras, ke ili devas esti modelecaj por la infanoj. En ĉeesto de la infanoj ili ne devas fumi aŭ trinki alkoholaĵojn, ili ne devas dum ilia ĉeesto petolaĉi kun inoj, aŭ kiel mi observis antaŭ nelonge, dum pioniroj laŭorde tramarŝis stratojn, perbicikle sin ĉasi unu la alian en tre sovaĝa maniero (kun samaĝuloj). Tamen tiun mankon oni povas dekutimigi. Sed unu difekto vere ne estas dekutimebla, tio estas la neĝusta komprenemo de l' infana animstato kaj pensmaniero. Se gvidantoj havas tian difekton, plej bone estas, tuj forigi ilin de ilia posteno. Ĉiujn aliajn difektojn, — ofte oni konstatas troan cedemon de la gvidantoj kontraŭ la infanoj, — oni povas ripari grade kun la pligrandiĝanta kutimo al la funkcio.

Nia plej grava zorgo devas esti, ke la movado neniam kaj neniel estas ligata al iaj personoj. Bedaŭrinde niaj fortoj ne sufiĉas, kaj ni ne havas grandan elekton, sed devas akcepti la bonvolulojn kiel gvidantojn, kaj tial la kelkaj personoj, kiuj havas la gvidon, formas la akson de la tuta movado en iu loko. Sed nia celo devas esti, trapasi kiel eble plej rapide tiun staton, krei pli kaj pli da gvidantoj kapablaj (per kursoj ktp.), tiamaniere, ke ni ne plu dependas de iaj fortoj. En München, kie plej malfacila por ni estas la agado, ĉar la pionir-movado estas malleĝa kaj la infanoj eĉ estas persekutataj de la polico (!), ekzemple dependas la tuta pionirmovado (estas pluraj grupoj) nur de la gvido de unu persono. Se oni arestos tiun K-don, tuj la grupoj disfalus. Tia stato kompreneble estas nesana, sed montras en akra klareco la gravecon de la demando, kiun mi komencis pritrakti per tiu ĉi artikolo.

Mi esperas kaj supozas, ke diversaj K-doj el niaj vicoj deklaros sian pozicion al tiu punkto kaj ankaŭ verkos kelkajn liniojn pri tiu problemo, por ke per kolektiva laboro ni ricevu ĝustajn direktivojn.

N. BARTHELMESS.

★

JUNULARA MOVADO EN MEZ-AZIO

La nur en la jaro 1921 komenciĝinta junulara movado de Mez-Azio havas tute alian estiĝhistorion ol tiu de la Centra Rusio. Ĉirkaŭite per blankaj armeoj, batalinte kontraŭ « blankuloj », verduloj, angloj ktp. ĝi ne povis havi la samajn vojojn kiel la aliaj movadoj. En la unuaj jaroj kiam la soveta potenco ankoraŭ ne estis firmigita, la junuloj organizis ĉelojn en lernejoj kaj laborejoj kaj bataladis kune kun la komunistoj por la akiro kaj firmiĝo de la soveta potenco. Nur en la jaro 1922 kiam la kontraŭrevoluciaj bandoj estis pelitaj el la lando, oni povis ekkomenci, starigi junularan union « la turkestanan ligon de la komunistaj junuloj ». Ĝi propagandis la komunismajn ideojn kaj unuigis pli kaj pli la gejunulojn en Mez-Azio, ne nur la rusajn, sed precipe la indiĝenajn. Nuntempe en Mez-Azio estas 250.000 organizitaj « Komsomolanoj » kaj pioniroj ĉe 7.000.000 da enloĝantoj. Por la tri jara ekzisto de la Unio sufiĉe granda

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

En la n-ro 96 de « S-ulo », ni petis la Legantaron, ke ĝi bonvolu fari por si rimarkojn kaj notojn pri sia gazeto. Kaj ni aldonis, ke oni bonvolu atendi alian alvokon nian, por komuniki onian opinion.

Sed kelkaj legantoj ne atendis kaj jam sendis siajn kritikojn — ĉu aprobajn ĉu malaprobajn. Entute ni jam konas la opinion de 17 K-doj kaj kvar grupoj. Kompreneble tiu malgranda nombro tute ne sufiĉas por ke ni konu la ĝeneralan opinion de la legantaro kaj ĉefe la opinion de la varbotaro. Neniam ni forgesu, ke temas precipe trovi aranĝon kapablan plaĉi al la granda amaso da indiferentuloj, kiujn ni devas varbi. Necesas do daŭrigi la enketon. Kaj por kuraĝigi la eventualajn kritikontojn ni hodiaŭ konigas pri sonoj, kiujn aŭdis ankoraŭ nia « maldekstra orelo » (1).

Jen el Berlin sono kiu riproĉas, ke: «...oni anstataŭis (2) *raportojn pri ĉio, kio interesas klasbatalantan kaj lerneman laboriston per ĵurnalistaĵoj kaj artifikaj belstilecaj* (3) *artikoloj, ekz. « Publika letero al S-ro Coolidge » aŭ longaj, malkoncizaj vojaĝ- kaj kongresimpresoj kaj multaj aliaj... La afero pri « Jubilea Ĉeno » al mi ŝajnas burĝeca, precipe la jubilea n-ro de « S-ulo » aspektis mizere... »*

Ni bedaŭrinde ne povas citi ĉion el tiu letero; almenaŭ ni aldonu, ke la artikoloj, pri « Fordismo », « Ĉu Marx eraris ? » trovis tamen ne malaprobon flanke de la kritikinto. Sed alia Berlinano diras : « ... jam delonge mi ne trovis sur la paĝoj de « S-ulo » temon pli interesan ol la demando « Ĉu Marx eraris ? » kaj tian neinteresan respondon ! »

Kiom da kapoj, tiom da opinioj.

Ni citis la du suprajn opiniojn por instigi la tutan Legantaron vortigi sian opinion. Ni ripetas, ke ni ne havas alian celon, alian ambicion ol fari, ke « S-ulo » plaĉu al kiel eble plej granda nombro da legantoj — konservante tamen sian laboristan, klasbatalan karakteron.

Ne timu do vortigi ĉu aprobe, ĉu malaprobe vian sinceran opinion pri via *semajna gazeto. La Red. nepre bezonas koni ĝin. Bedaŭrinde ne ĉiam estas eble kontentigi pravajn postulojn, ĉar ne dependas de ni, se el multaj landoj ni ne ricevas ion presindan.*

Red.

1) Nia maldekstra orelo aŭdas nur la malaprobajn kritikojn kaj la dekstra la laŭdajn.

2) Fakte ni tute ne « anstataŭis » la deziratajn raportojn tial, ke krom el Sovetio, ni tre malmulte ricevis da ili kaj ĉiujn enmetis.

3) Rilate ĉi-punkton estus tre facile kontentigi la kritikintojn, sufiĉus ja ne prilabori la ricevitajn skribaĵojn — kio ŝparus al ni tempon kaj ceteron !



KION NI ATENDAS DE NIAJ KORESPONDANTOJ ?

La plej bona propagandilo de la internacia lingvo estas nacilingvaj, neesperantaj gazetoj, kiuj havas neniajn interrilatojn kun la esperanto-movado. Plej bone laboras tiuj SAT-grupoj, kiuj sukcesis uzi por sia laboro nacilingvajn gazetojn. Simpla noto, ke la letero aŭ artikolo estas ricevita en esperanto, faras pli fortan impreson, ol dekoj da priesperantaj artikoloj.

Sed en tre malbona situacio troviĝas tiuj SAT-anoj, kiuj priservas gazetojn, *ĉar ili ne havas sufiĉe da materialo.* Kie ni povas ĝin trovi ? Nur en SENNACIULO kaj el leteroj, kiujn ni private ricevas el eksterlando. En ĉiu n-ro de SENNACIULO taŭgas por represado nur 2-3 artikoloj, iam eĉ neniu, ĉar sovetaj laboristaj gazetoj tute ne bezonas de ni artikolojn, priskribantajn la vivon de iu lando (1) entute (tiujn artikolojn ili jam havas sufiĉe), sed **leterformajn artikoletojn, priskribantajn iun fakon de la loka vivo;** kaj estus pli bone, se tiuj leteroj estus skribitaj en la nomo de iu grupo aŭ kolektivo.

Tial la plej grava fonto por nia peresperanta gazeta laboro estas la leteroj de niaj ekterlandaj amikoj. Ili abunde atingas nin el diversaj partoj de la mondo kaj priskribas al ni la plej diversajn okazintaĵojn. Iam ili estas malesperaj kaj diras al ni pri persekutadoj de kapitalistaro — iam ili estas batalemaj kaj alvokas popolamasojn al la batalo. Sed plejparte ili diras al ni pri nenio grava — ili priskribas la belaĵojn de la hejmlando aŭ pure burĝajn, lokajn sensaciojn. Ni ne povas utiligi la tutajn leterojn — ni tradukas plejparte duonon aŭ eĉ malpli el la letero, eĉ kelkajn liniojn aŭ en unu artikolo faras revuon de multaj leteroj. Tial perdiĝas granda kvanto de la laboro kaj multe da materialo restas neeluzita.

Por ŝpari la tempon, por havi la eblecon vidi ĉiujn siajn leterojn presitajn, niaj eksterlandaj korespondantoj devas scii, *pri kio* skribi kaj *kiamaniere* al ni skribi.

Ni tute ne bezonas longegajn, arte kaj bonstile verkitajn artikolojn, ni bezonas nur simplajn leterojn de niaj korespondantoj (kiuj estas sendube preskaŭ ĉiam laboristoj), en kiuj ili senĝene diru al ni pri diversaj flankoj de sia vivo. Por ni kaj nia legantaro estos interese el la letero de simpla laboristo ekscii, **kiaj laborkondiĉoj estas en iaj lokoj de iu lando** *kaj estas grave, se tion priskribus okulvidinto mem.* Same interese por ni estas legi pri *politikaj rajtoj* de laboristoj, pri persekutado de laborista movado, pri laboristaj idealoj kaj la sento de la tutmonda laborula frateco.

Sovetio estas plejparte kamparana, sekve interesa por ni estas la vivo de kamparanoj, ĉu ili estas kontentaj pri sia sorto, ĉu la tero, kiun ili plugas, estas ilia propra, je kio ili esperas en estonteco ktp., ktp.

La movado de junularo, de virinoj, de profesisindikatoj, situacio de soldatoj, de metiistoj ; iaj gravaj okazintaĵoj ĉe vi, kiuj karakterizas vian situacion — ĉio ĉi estas por ni interesa kaj povas esti uzata por la gazetoj.

Preskaŭ la tuta nia koresponda laboro devas aspiri al priservo de gazetaro ; kiam la gazetaro estos por esperanto — same por esperanta estos la socia opinio.

Por la Minska oficejo de l' internacia lab. interligo P. KIRJUŜIN.

Minsk.

(1) Nek artikolojn temantaj pri Sovetio. Kaj precipe tiajn artikolojn ni ricevas. — *Red.*



UKRAINIA SINDIKATARO GVIDAS NIAN MOVADON

Jenan rezolucion akceptis la 8-an de septembro la konferenco de la kulturfakoj en la Tutukrainiaj Centraj Administrejoj de sindikatoj : « Por akceli la disvastigon de internacia interkomunikado de la proletaro, oni rekomendas al la sindikatoj ĉiel helpi, por ke la lernado de esperanto disvastiĝu inter la membroj de la sindikatoj, per aranĝado de esperantaj rondetoj en kluboj kaj en fabrikejaj ruĝaj anguletoj. »

Instigite de ĉi decido la kulturfako de la Ĥarkova Distrikta Sindikatkonsilantaro aranĝis specialan kunsidon kun reprezentantoj de la Ĥarkova Komitato de SEU. La kunsidanoj unuanime akceptis jenan rezolucion, poste konfirmatan de l'administranto de la kulturfako, K-do Kessel : « Ĉar la disvastigo de esperanto inter la laboristaro estas ligata kun praktika utiligo de la lingvo por ĉiaspeca internacia interligo kun laboristoj, ĉefe por internacia laboristkorespondado, ĉar tial oni ĉiam devas akceli plimultiĝon de la reto el esperantaj rondetoj kaj kursoj en laboristaj kluboj kaj laborejoj, la kunsidanoj opinias necese estigi jenon :

1) La Kulturfako de ĤDSK prenas sur sin la gvidadon de la Ĥarkova organizo de SEU,

(*Daŭrigo de l' « Junulara Paĝo »*)

sukceso. 50-55 % de la membroj estas indiĝenaj junuloj. Ankaŭ la antaŭe al la ĉambroj katenigitaj kaj kiel enkarcerigatoj traktitaj virinoj (junulinoj kaj knabinoj) partoprenas jam vigle al la movado, la virina membrokvanto atingas proksimume 30 %. Nek islamo, nek mulloj (muselmanaj pastroj) kaj aliaj malfacilaĵoj povas malhelpi la rapidan kreskon de la organizo. La laboro de la organizo konsistas en spirita kaj fizika edukado kaj klerigado de la membroj ; organizado de pioniraj organizoj, partoprenado al la laboro de la lokaj sovetoj ktp. Entute estas la celo de la organizo, la preparo de kapablaj anstataŭantoj por la soveta, komunista laboro de la estonteco.

N. SOKOLOV.

laŭkiome la lasta laboras inter la sindikatanoj. 2) Tiucele la kulturfako delegas en la ĤK-ton de SEU sian reprezentanton. 3) Por la planeca konsilado pri organizo kaj metodoj de la laboro en esperantaj rondetoj kaj kursoj oni establas ĉe la kulturfako per la fortoj de Ĥarkova organizo de SEU esp-o-konsilejon. 4) Oni aranĝas ĉe la « Ĉambro de Kulturlaboristo » angulon de esperanto.

Ĉi tiuj decidoj de l' konferenco de Kulturfakoj kaj de la Ĥarkova Kulturfako malfermas novan epokon en nia laboro kaj movado en Ukrainio. Jam nenia kluba « suprulo » povas malpermesi aŭ malakceli malfermon de esperantaj rondoj, apogante sin al la silento de la sindikata « suprularo ». Ni esperas, ke aliaj distriktoj de Ukrainio, instigate de la proletaj esperantistoj, sekvos la ekzemplon de la Ĥarkova Kulturfako por plenumi la decidon de la konferenco de Kulturfakoj. Kaj ĉi tio ekzempligos Ukrainion por aliaj landoj.

A. Tomo.



PERESPERANTA GAZETSERVADO

Gubernia komitato de S. E. U. en Samara (USSR) obeante la rezoluciojn de la VI-a Kongreso pri internacia korespondado, organizis tiucele specialan oficejon.

La ricevitaj leteroj estas uzataj en loka ĵurnalaro. Al la korespondintoj « Labintkor » ŝange sendas siajn artikolojn. Por ke la artikoloj havu ian signifon, « Labintkor » ricevas tiujn de kompetentaj aŭtoroj (ne esp-istoj). Tiel prezidanto de loka ateista ligo jam prezentis sian artikolon pri ateista movado en USSR. Agronomoj de Gubernia Fako Agrikultura, gvidantoj de politik-kleriga laboro, ĉefoj de sindikata movado loka kaj aliaj ankaŭ konsentis kunlaboron kaj prezentas siajn artikolojn. Tiele la korespondado staras sur firma bazo. Ĉiu demando, kiu interesos la eksterlandajn K-dojn, estas respondota de kompetentulo pere de «Labintkor».

Por disvolvi la servadon, « Labintkor » nun grupigas lokajn ĵurnalistojn kaj laboristajn korespondantojn. Necesas, ke eksterlandaj K-doj vigle respondu nian entreprenon per siaj leteroj. Necesas, ke la leteroj entenu pli da *fakta* materialo pri diversaj aktualaj (en la donita loko) demandoj. Por « Labintkor » estas malpli interesaj teoriaj diskutadoj, ol ties praktika aplikado.

Certe ankaŭ teoriaj artikoloj estas bonvenataj, sed ili estos transdonataj al respektivaj specialistoj por ilia persona utiligo. « Labintkor » aperas ja ankaŭ kiel peranto inter diversaj profesiuloj de Samara kaj tiuj de aliaj landoj. Poŝtistoj, fervojistoj, metalistoj, agrikulturistoj, klerigistoj, radi-amatoroj, sportuloj, ĉiu povas amikiĝi kun samspecaj organizaĵoj aŭ unuopaj K-doj ĉi-tieaj.

Do ni atendas la resonon inter la tutmondaj SAT-anoj; ili tuj skribu pri siaj aferoj al nia « Labintkor ». Adreso: *Samara, Poŝtkesto 9*.

P. Astafjev (*4605*).



KRONIKO

Germanio.

Düsseldorf. — Nia SAT-kongreso donis al ni trafan rimedon por praktike valorigi k. eluzi ĉi fakton por la propagando. Post la reveno de K-do Stöcker el Leningrad, ni aranĝis publikan kunvenon kun la temo: « La proleta esp. mondkongreso en Leningrad k. impresoj pri Sovetio ». Bedaŭrinde la kunveno pro iaj kaŭzoj ne estis kontentige vizitata; sed preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj nun partoprenas kurson. Plue K-do Stöcker referatis en sep membrokunvenoj de la kom. partio, junularo ruĝaj frontbatalantoj. Aŭskultadis ĉirkaŭ mil personoj. Unuanime ĉiuj diskutintoj pledis por esp-o, rekonante la valoron de internacia lingvo. Krom en ĉi kunvenoj la delegito referatis en membrokunveno de la liberpensuloj antaŭ 200 aŭskultantoj, k. en Solingen en publika kunveno antaŭ 100 aŭskultantoj k. fine en la SAT sektorkonferenco en Dortmund. La du proletaj gazetoj aperigis multajn artikolojn. Ni aranĝis kelkajn novajn kursojn en diversaj urbkvartaloj. Horo.

Leipzig. — Okaze de la novaj kursoj estis farata sufiĉe bona propagando. La sukceso estas jena: 9 publikaj kursoj kun 205 partoprenantoj; kurso ĉe gimnastikunuiĝo kun 20 p.; kurso ĉe « Ruĝa frontbatalantligo » kun 30 p.; kurso por progsesantoj kun 12 p. Pluaj du kursoj ĉe « ruĝaj frontbatalantoj » sekvos. Laŭ la lasta nombrado, la Leipziga LEA-grupo havas 202 membrojn.

(5486).

Sovetio.

Ivanovo Voznosensk. — Komence de okt. estas malfermitaj ŝtataj kursoj ĉe Gubernia Fako de Profesia Klerigado. La kursoj, kiuj daŭras du jarojn, dividiĝas en du fakoj: 1) Ĝenerala instrukurso; 2) Pedagogia k. korespondinstrukurso. La lernantoj de la unua pagas 3 rubl. k. de la dua 5 rubl. pomonate.

Sverdlovsk. — 26-9-26, oni organizis ĉi tie distriktan komitaton de SEU. Funkcias kelkaj rondetoj kun sume 100 K-doj. Novaj rondetoj estas preparataj k. samtempe kursoj por perfektiĝo. Oni fondis SAT rondon; kiel peranto estas elektita K-do Jeleznjakov. Estas intencata partopreni la feston de la datreveno de la oktobra revolucio kiel organizitaj ge-esp-istoj. Sendu salutleterojn aŭ pk. okaze de ĉi jubileo. Ĉi tio tre multe helpus al nia movado.

Tiflis. — Instigite per la postkongresaj impresoj ankaŭ en nia urbo ree ekkomencis la laboro. La 14-10-26 okazis kunsido de la loka esp. komitato, kiu decidis tuj organizi « Labeskor », agi entute « per » esp-o. Nia unua laboro estis almiliti la lokan gazetaron. Ni ankaŭ bone sukcesis. Aperis dum du semajnoj 4 artikoloj favoraj al esp-o k. du tradukoj el « S-ulo ». Sed nia plej grava venko estas, ke oni sin turnas al ni kun la insista peto doni kiom eble plej multe da tradukoj, kiujn oni tre bezonas. Ni nun vigle tradukas, k. tiuj sukcesoj plifirmigis nian decidon pri la sola valoro de la peresperanta laboro. Sed por ke la sukceso estu daŭra, estas necesa la helpo de la tutmonda SAT-anaro. (*6335*).

Tver. — La 2 okt. komencis la ŝtataj esp-o kursoj. Ili daŭras tri jarojn, la kurskotizo estas por unu jaro 40 rubloj. Sume lernas ĉe tiuj ĉi kursoj 54 personoj. Ili estas organizataj de la Gubernia Fako por profesia edukado. *(1116).*

ALVOKO

« Lab. esp. rondeto » ĉe kultur-gimnastika asocio « SITA » en Mar. Hory, dez. vintre aranĝi propagand-vesperon kun rondiranta ekspoziclo. Ĉar mono mankas, ĉiuj gek-doj, Red. k. esp. grupoj el tutmondo estas petataj sendi al ni laŭpove esp. gazetojn, murafiŝojn, broŝurojn, salut-leterojn k. div. ekspoziciaĵojn. Al ĉiuj donacontojn, sinceran dankon! Sendu ĉion al: K-do *Jozefo Sedzimir*. Horni osada, 423, *Mar. Hory* (Ĉekoslovakio).

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sidejo: 23, Rue Boyer, Paris-XX

Adm. Ŝekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 — Poŝtĉeko n-ro 6835

CELO: Utiligi praktike la internacian lingvon esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda.

OFICIALA INFORMILO

Kotizo 1927. — Por ke la renovigoj de membrecoj por la jaro 1927 ne koncentriĝu je unu monato, ni jam nun petas niajn membrojn pagi la kotizon por la jaro 1927. Por eviti konfuzon ĉiu membro bonvolu kontroli sian membrokarton kaj se ĝi ne havas la kotizmarkon stampitan por la jaro 1927 kaj deziras, ke ĝia adreso aperu en la Jarlibro, li devas nepre renovigi la membrecon. Ju pli rapide vi agos en tiu afero despli frue ni povos kompili la adresaron por la Jarlibro.

Aldonu vian SAT-numeron. — Kvankam ni kelkfoje jam atentigis la membrojn pri tiu grava afero, ni tamen devas konstati, ke ne ĉiuj plenumas tiun etan devon. Ĉe interrilatoj kun la Administracio kaj Redakcio *vi neniam forgesu aldoni vian SAT-numeron.* Tiu forgeso kaŭzas al ni kelkfoje malagrablaĵojn.

Kamaradoj en Ĉekoslovakio. — Por pli faciligi al vi la pagadon de mono al SAT por membrecoj, abonoj, libromendoj ktp. ni atentigas vin, ke denun vi povas sendi viajn mendojn kaj monon al K-ino *Filomena Lustinetz*, Hopfengarten, 27, *Bodenbach, III.*, poŝtĉeka konto: *Praha 27998.* Ŝi estas nia oficiala reprezentantino en la Ĉekoslovaka ŝtato. Postulu enpagilojn!

Adm.



MUNICIO POR SAT KAJ ĜIAJ ORGANOJ (de 4 Sept. ĝis 18 Okt.)

Belgio: 1837 — 12 fr. bel. *Britio:* 6259 1/2 ŝil. *Germanio:* 4151 — 0,50 mk.; Beiermann-Bielefeld 0,40 mk. *Sovet-Unio:* 54 0,25 rubl.; 5328 — 0,37 rubl.; 7495 — 0,45 rubl.



NIA POŜTO

K-do Karey (Mainz). — Vian poŝtkarton ni sendis al la Red. de « S. R. » (Moskvo).

K-do G. Reimann (Berlin) *k. g. Kahl* (Giessen). — Viajn lingvajn respondojn ni transsendis al K-do Revo. Red.

Porfirjev: 47, 48 kaj 49 vi ricevis, sed sub formo de kuranta numero. Pro fuŝado de la numerado vi estas erarigita.

Al multaj: Ni ne respondas, se la afranko por la respondo mankas. Adm.



AL LA VEGETARANOJ

Mi substrekas la decidon de nia vegetarana SAT-fakkunsido, ke ĉiuj K-doj en iliaj lokoj mem devas trovi la plej bonajn metodojn de la laboro k. sciigi pri siaj sukcesoj la centron. Dume mi persone proponas: 1) Ĉiu vegetarano sendu almenaŭ malgrandan sumon por subteno de SAT-« Jubileo-Ĉeno ». (La redakcio substreku, ke sendas vegetaranoj por ke la nomaro estu por ni *intervoksignalo*). 2) Ni devas pligrandigi nian partoprenon en la SAT-kooperativo por ebligi la eldonon de vegetarana literaturo k. poste por garantii vegetaranajn kooperativajn entreprenojn. 3) Plivigligi la propagandon pere de nacia gazetaro.

J. Brukson (*1896*).
Sekr. de la veget. SAT-fako.

BIBLIOGRAFIO

Dokumentaro *de la oficialal institucioj al XVIII-a Universala Kongreso de Esperanto.* Eldonejo ne menciita. Formato: 14 × 22 cm. 46 pĝ. Prezo ne montrita.

De ĉi broŝuro troviĝas: 1) Raporto de I. C. K.; 2) Raporto de U. E. A.; 3) Raportoj de la Prez. de l' Akademio kaj de la Direktoroj de l' Sekcioj. El la Raporto de la Direktoro de la Sekcio pri Komuna vortaro, S-ro E. Grosjean-Maupin, ni eltiru jenon por la utilo de nia legantaro kaj precipe de nia kunlaborantaro:

«... Niaj plej timindaj malamikoj ne staras ekster niaj vicoj; ili staras inter ni, ili estas tiuj, kiuj pro *nesufiĉa lernado* kaj *tro frua verkemo* kaj *presiĝemo* enkondukas senrespekte en la presan lingvon la neeviteblajn malkorektajojn de la buŝa lingvo kaj naciigas la internacian lingvon. «Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia», diris Zamenhof.

Bulteno *de Internacia Scienca Asocio Espperantista* (n-ro 4). Red. S-ro Rollet de l' Isle, 35, rue du Sommerard, *Paris;* Adm. S-ro C. Rousseau, 4, Place de la République, Levallois-Perret (Seine) Francio. Formato: 16 × 24 cm. 16 pĝ. Jarabono: 0,5 dolaro.

Ĉi kajero enhavas unuapaĝe... la nomaron de la membroj; poste sekvas raporteto pri kunsido de asocianoj ĉe la XVIII-a Esp. Kongreso: «Postkongresaj ekskursoj» kaj fine «Raporto de la Sekcio pri Teknikaj Vortaroj» (raporto kiu troviĝas ankaŭ en la ĉi supre menciita «Dokumentaro» (!!) Kaj estas ĉio. Sciencaĵoj forestas, kaj la sciencemaj esperantistoj povas trovi pli da priscienca legaĵo en la eldonaĵoj de SAT. Miriga la fakto — sed fakto.

Nova ekonomia politiko. Eldonejo: A. Meissner, Frankenthal, *Pfalz* (Germanio). Formato: 15 × 23 cm. 8 pĝ. Diversaj abonprezoj laŭ la landoj.

Ĉi nova monata revueto «pri monsistemaj, ekonomiaj kaj kulturaj aferoj» estas redaktata de K-do G. Kolb (SAT-ano 79) kaj celas disvastigi la teorion de S. Gesell. Bonan ŝancon!

★

MEMORNOTO

Represis el «Sennaciulo». — *Arbeiderbladet,* Oslo, 27-9-26: «Fordismo» (103). — *Nijegorodskaja Komuna,* Nijni Novgerod, 30-9-26: «La humaneco de rotterdama urbestraro» (93). — *Die Betriebsorganisation,* Germanio, 1-10-26: «La Hispania kaoso» (100). — *Proletarischer Zeitgeist,* Zwickaŭ, okt. 26: «Hispania Kaoso». — *Der freie Arbeiter,* Berlin, 9-10-26: «Unuecfronto de la burĝaro en Ĉeĥoslovakio (101). — *Die Schwarze Fahne,* Berlin, okt. 26: «Unuecfronto de la burĝ. Ĉeĥosl.». — *Sächsische Arbeiter Zeitung,* Leipzig, 14-10-26: «Fordismo» (103). — *Der sozialistische Freidenker,* Leipzig, aŭg. 26: «Franca liberpensa organo por esp-o» (92). — *Leipziger Gewerkschaftszeitung,* Germanio, okt. 26: «Sekreto de siberia Tajga» (102). — *Ruhr Echo,* Essen, 1-10-26: «Fordismo» (103). — *Neue Zeitung,* München, 15-10-26: «Kion bedaŭras la delegitoj al Sovetio» (106). — *Raboĉaja Pravda,* Tiflis. 1-10-26: «La hispania kaoso» (100) kaj «Faŝismo en Svedio» (102).

Enhavas notojn pri SAT. — *Leipziger Volkszeitung,* Germanio, 18-9-26. — *Der sozialistische Freidenker,* Leipzig, okt. 26. — *Molodiji Boljevik,* Kiev, 10-10-26. — *Radio de Filintern,* Moskvo sept. 26.

Enhavas priesperantajn artikolojn. — *Freie Sportwoche* kaj *Freier Wassersport,* Leipzig, 29-9-26. — *Arbeiterjugend,* Berlin, sept. 26. — *Naj Putj,* Kremenĉug, 21 kaj 22-9-26.

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L — letero, PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. esp-ajo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Anglio.

K-do Arthur Whitham tre dankas al ĉiuj k-doj, helpintaj al li dum sia restado en Sovetio. Atentigas siajn koresp-antojn pri sia nova adreso. *Arthur Whitham,* 13 Reed Street, *Burnley.*

— K-do *E. L. Sporrer,* 120, Commercial Road, *South Shields, Durham,* interŝ. L, PI, k. sovetiaj K-doj.

Finnlando.

K-do *Uuno Björkquist,* Osuusliike, *Imatra,* dez. interŝ. L, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Yrjö Rundberg, Imatra* ĉe Aschan, dez. koresp. pri ĉ. temoj L, PI, k. ĉ. l.

Francio.

K-do *Reue Martin,* 2, rue Sarrebourg, *Bourges Cher,* dez. interŝ. P. I. k. ĉ. l., ĉefe kun fotografantaj maristoj.

Germanio.

K-do *Bruno Rhodius,* Theaterstr. 58, II. *Glauchau i. S.* dez. koresp. pri ĉ. temoj L, PI, bfl. k. ĉ. l.

— 8 gelernantoj dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Adr.: K-dino *Emmi Storsberg,* Erferstr. 22, *Solingen-Höhscheid.*

— Grupo Esperantista, Regensburg dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l. Certe resp. Adr.: *Laborista Esperantista Grupo,* Landshuter Str. «Paradiesgarten», *Regensburg i. Bay.*

— K-do *Rudolf Martini,* Fechnerstr. 11, ptr. *Leipzig, N. 22,* dez. koresp. k. ĉ. l.

— K-do *Walter Keller,* Hallische Str. 167, *Leipzig, N. 23,* dez. koresp. k. ĉ. l.

— K-do *Bruno Rönnebeck,* Koloniestr. 129, *Berlin, N. 20,* dez. koresp. k. ĉ. l., PI, precipe interŝ. bonajn bildkartojn.

— K-do *Fritz Haufe,* Fichtenstr. 11, I., *Dresden, N. 6,* pro senlaboreco ne povas resp. al ĉ. sovetiaj K-doj k. ĉi-loke petas pardonon. Tamen dez. anglajn koresp.-antojn.

Hispanio.

K-do *Gregorio Bley,* str. Centena, 5, *Sabadell,* pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— K-do *Galileo Molins,* str. Riego, 21, *Sababell,* pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— K-do *Josefo Canellas,* str. Pérez Galdós *Sabadell,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-do *Antojno Criach,* str. Covodonga, 259, Pis. *Sabadell,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-do *Jaume Viladoms,* str. Pérez Galdós, *Sabadell,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-do *José Miró,* Str. Colón, 22, *Palma de Mallorca,* interŝ. PM, k. ĉ. l., mi ankaŭ sendas PI kontraŭ PM. Resp. garantiata.

Litovio.

K-do *Edv. Mediŝauskas,* Traku ap., *Kietaviŝkis,* dez. koresp. pri skulptartaj kaj aliaj temoj. L, PI, k. ĉ. l. Certe resp.

Sovet-Unio.

K-do *A. F. Groĥotov,* Radiostacio, *Ĥerson,* dez. koresp. k. ĉ. l. ankaŭ serĉas koresp-antojn por lokaj sindikatoj k. murgazetoj.

— K-do *V. S. Belogorcev,* ruĝarmeano, Avtpolk, 21, *Tomsk,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— *Grupo de lernantoj* (12-17 j.) Ŝkola V. U. Z.. *Tomsk,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ.l.

— K-do *Koŝelev,* Vagonnaja kontora, ĵel.-dor. masterskije, *Saratov,* kun gekomjunularoj el ĉ. l. Ĉiam resp.

— Moskva Societo Esp. «Reciprokhelpo» dez. koresp. kolektive, k. ĉ. l. Adr.: K-do *Liljer,* Brjanskij vokzal, Tenniĉesk. Otdel, 1 Otdelen Eksploatacii, *Moskvo.*

— K-do *V. Krasnodembskij,* Petr. st. B. Raznoĉinnaja, 19, b. kv. 39, *Leningrad,* dez. koresp. precipe kun eksterlandanoj.

— K-do *A. P. Veliĉko,* str. de «25 Oktobro», *Nikolaeevsk,* (instruisto 24 j.) dez. koresp. pri politiko, pedagogio k. scienco, k.ĉ,l.

— K-do *T. Fedotov,* Polovecka-str. 18, 8, *Kiev-Lukianovka,* dez aĉeti aŭ interŝ. «Proverbaron Esperantan» de Zamenhof.

— Skribu pri vivo de lab-istoj k. vilaĝanoj, sendu ilustraĵojn al K-do *Krapivin, P.,* P/O *Jakovleviĉi,* Orŝan okr. (Blankrusio). Resp-on garantias.

— Gazetkoresp-anto K-do *H. Frank,* Solikamskij trakt, Nr. 5 *Motoviliĥa,* Pernskogo Okr., dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉiutaga vivo de lab. pri div. okazintaĵoj kun fotoj. Ĉiam resp., let. represas loka gaz.

— K-do *M. Leŝĉinski* (16 j.) Gogolevska, 108 *Ĉerkasi,* interŝ. PM. k. gazetojn.

— K-do *I. A. Makarin,* B.I.V.M., Buro Uĉeta Materialov, *Ivanovo-Voznesensk,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— Esp. gelernantoj dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata. Adr.: *Kruĵok Esperanto,* Tekstiln. Tresta, *Pravlenie Gosudarstv.,* Ivanovo Voznesensk gub.

— Interlig-ĉelo ĉe fabriko, dez. koresp. kun profesiaj k. partiaj organizaĵoj pri ĉ. temoj, Resp. garantiata. Adr.: *Klubo al Smirnov,* N.I.V.M., *Ivanovo-Voznesensk.*

INSTRUISTOJ

ABONU

Internacia pedagogia revuo
Jarabono 2.50 mk.

NOVAJ TEMPOJ

Oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Specimenon petu de
M. GOLDBERG, Klemstr. 14, p., LEIPZIG S 3

SENNACIECA REVUO

ENHAVO
de la septembra numero:

Labormarkoj. Trad. Erich Haseloff. — Av. Isahakjan: *Abu-Lala-Mahari.* Trad. G. Sevak. — Ŝolem-Alejhem: *Tri Kapetoj.* Trad. Ŝio Traŭbe. — Jean Jaurès: *La minkarbo kaj la tritiko.* Trad. E. Lanty. — *Pri energio.* Kompilis G. Demidjuk. — Mark Starr: *Edukada skemo de la Brita Laborist-Sindikataro (T. U. C.). Fondo de Laborist-Universitato.*

★

Mendu ĉe Administracio de SAT

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Proverbaro Esperanta
de D-ro ZAMENHOF
(eldono de Centra Librejo Esperantista)

82 paĝoj. Prezo, afrankite: mk. g. **1,50**
(havebla ĉe nia Administracio)

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono: Gobelins 62-71